

# Flaŭro de Brno

Oldřich Arnoř Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 18-an de septembro 2021

Urbo Brno estas la dua la plej granda urbo de Ĉeĥa Respubliko kaj la plej granda urbo de Moravio. Ĝi etendiĝas sur la areo 230,18 km<sup>2</sup> kaj situas proksime de la 49-a norda latituda paralelo (49°11'43" de longa latitudo kaj 16°36'30" de orienta longitudo) en la altitudoj 190 – 497 m.

En la jaro 2021 oficiale Brno havas 382 405 loĝantojn, sed precipe en laboraj tagoj la urbon vizitadas laboristoj, studentoj kaj vojaĝantoj, tial en Brno estas pli ol 400 000 da civitanoj.

Averaĝa jara aera temperaturo estas 9 °C. Vintra averaĝa aera temperaturo estas –2 °C, printempa 8 °C, somera 17 °C kaj aŭtuna 10 °C. Meznombro dum la jaro la urbo havas 260 senfrostajn tagojn kaj 50 somerajn tagojn.

Averaĝa jara sumo de precipitaĵoj estas 500 mm (125 mm vintre kaj printempe, 250 mm somere kaj 150 mm aŭtune). Averaĝa jara nombro de tagoj kun neĝa falo estas 60 kaj neĝa kovraĵo (alta 15 – 30 cm) kuŝas sur tero meznombro 60 tagojn.

Averaĝa jara relativa aera humideco egalas al 75 % kaj averaĝa jara rapideco de vento estas 5 ms<sup>-1</sup>.

En Brno ekzistas diversaj biotopoj, ekzemple:

- salikaj arbedaroj de teraj kaj sablaj aluvioj (K 2.1),
- marĉaj arbaroj (L 2),
- herciniaj kverkaj kaj karpenaj arbaroj (L 3.1),
- mezeŭropaj varm-amantaj kverkarbaroj (L 6.4),
- piceaj arbaroj (L 9),
- fragmitaroj de stagnantaj akvoj (M 1.1),
- apudborda kreskaĵaro de rojoj (M 1.5),
- malsekaj cirsiaj herbejoj (T 1.5),
- urbanizitaj (prikonstruitaj) teritorioj (X 1),
- intense kultivataj kampoj (X 2),
- malintense kultivataj kampoj (ĉedomajoj)(X 3),
- intense kultivataj herbejoj (X 5),
- eksterdomaj artefaritaj areoj kun rara plantaro (X 6),
- eksterdoma rubeja herba plantaro (X 7),
- nearbaraj eksterdomaj areoj kun arboj (parkoj, ĝardenoj, tombeoj, aleoj)(X 13).

En la jaro 2010 en la regiono Brno-urbo estis 33 protektataj teritorioj.

Plantoj en Brno estas en kampoj, parkoj, tombeoj, ĝardenoj, fruktĝardenoj, sur balkonoj kaj terasoj, en ĉambroj, ĉirkaŭaj arbaroj, ĉasarbaro, zooĝardeno, botanika ĝardeno, arboreto. Interesa grupo estas rubejaj plantoj, kiuj rapide ekposedas ĉiujn liberajn lokojn.

En forcejo de botanika ĝardeno (Universitato Masaryk, Brno).



En la Naturscienca Fakultato de la Universitato Masaryk estas botanika ĝardeno, kiu ĉiutage estas malfermita por publiko.

Universitato Mendel havas arboreton, en kiu oni de tempo al tempo aranĝas ekspoziciojn de orĥideoj kaj irisoj.

En specialaj vendejoj precipe riĉuloj elspezas grandajn sumojn por novaj floroj, arbedoj kaj arboj. En urbo laboras anoj de Ĉeĥa Hobiĝardenista Asocio (*Český svaz zahrádkářů*). Speciala organizo de la Asocio estas la grupo *Lilium Brno*. En la societo *Astrophytum* renkontiĝadas amantoj de kakttoj.

El elstaruloj, kiuj okupiĝis pri plantoj, mi mencias nur tri:



### **Gregor Johann Mendel**


(20.VII.1822 – 6.I.1884) naskiĝis en Hynčice (Silezio). Lia gepatra lingvo estis germana lingvo, sed en Moravio li baldaŭ ellernis ĉeĥan lingvon. Li estis aŭgustinana monaĥo, post forpaso de abato kaj granda filantropo Cyril František Napp (1792 – 1867) Mendel fariĝis abato de monaĥejo, kiu science okupiĝis pri meteorologio kaj botaniko. Dum siaj eksperimentoj kun pizo (*Pisum sativum*), *Mirabilis jalapa*, *Hieracium* spp. kaj aliaj organismoj li malkovris bazajn heredecajn leĝojn. En la jaro 1866 li publikis rezultojn de siaj eksperimentoj en la libreto *Versuche über Pflanzen-Hybriden* (Eksperimentoj kun Plantaj Hibrido).

Mendel kaj rezultoj de lia laboro estis dufoje forgesitaj. Unuafoje post lia morto, kiam monaĥoj laŭkutime bruligis lian proprajon. En komenco de la 20-a jarcento okcidentaj sciencistoj Hugo de Vries (1848 – 1935), Carl Correns (1864 – 1933), Erich von Tschermak (1871 – 1962) kaj William Bateson (1861 – 1926) malkovris forgesitan Mendel-on.

En Sovetunio reĝimo de Stalin genetikon de Mendel malpermesis. Bonegaj sovetaj sciencistoj estis postsekvitaj, ekzekutitaj aŭ senditaj en gulagojn (sovetajn koncentrejojn). Ĉarlatanoj, kvazaŭsciencistoj Olga Borisovna Lepešinskaja (1871 – 1963) kaj Trofim Denisoviĉ Lysenko (1898 – 1976) trumfis. Ankaŭ en socialisma Ĉeĥoslovakio (soveta satelito kun totalisma reĝimo), kies komunistaj regantoj propagis „sciencan ateismon“ kaj postsekvus kredantojn (precipe romkatolikojn), en la 50-aj jaroj oni pri genetiko de Mendel (kristano, monaĥo kaj eĉ abato) ne instruis.

En ombro de Mendel restis **Jiří Josef Kamel** (21.IV.1661 – 2.V.1706), latine *Camellus*, kiu naskiĝis en Brno. Li estis moraviano, jezuita misiisto, apotekaristo, botanikisto, kiu science latinlingve priskribis flaŭron kaj faŭnon de Filipinoj. Lian nomon portas grupo de plantoj el la genro *Camellia*, ekzemple *Camellia sinensis*, el kies folioj oni preparas teon. Laŭ socialisma (komunisma) vidpunkto Kamel havis eĉ pli malbonan reputacion ol Mendel, ĉar li estis jezuito. Dum socialismo oni pri jezuitoj parolis kaj en lernejoj instruis nur malbone. Jezuitoj estis edukitaj, laboremaj kaj disciplinitaj. Se en la 17-a jarcento iu foriris labori en misio, tio signifis de tie ne plu revenos. 45-jara Kamel mortis

en Manila kaŭze de infekta intesta malsano. Post la jaro 1989 en Brno estis instalita ekspozicio de kamelioj kaj nomo de Kamel estis rememorita. Mi ĝojis, ke mi povis iomete helpi al aranĝantoj de la ekspozicio.



Doc. RNDr. Ing. **Jaromír Šikula**, CSc., dr. h. c. (29.V.1924 – 29.V.2000) estis altlerneja pedagogo, botanikisto en la Bestkuracista Universitato de Brno, esperantisto kaj nia longtempa klubano. Studentoj kaj hobiĝardenistoj lin ŝatis. Bestkuracistoj devas scii plantojn, por ke estimu kvalitojn de paŝtejoj kaj furaĝo por bestoj. Pri plantoj ili lernas ankaŭ dum studado de bestkuracista toksikologio kaj juĝa bestkuracista medicino.

Se oni nuntempe volas reformi instruadon kaj redukti natursciencan kaj historion dirante, ke ĉiuj informojn studentoj povas trovi perrete, mi kun tio ne konsentas. Laŭ mi lernantoj devas trejni memoron kaj konatiĝi detale kaj precipe praktike kun botaniko. Neinformitaj homoj povas kaŭzi erarojn.

*Allium ursinum* (manĝebla) kaj *Colchicum autumnale* (venena)




Ekzemple printempe en la arbaroj, proksime de Brno, aperas sovaĝa ajlo (*Allium ursinum*). Tiam tutaj familioj de urbanoj iradas kolekti foliojn de la ajlo. Sed jam okazis, ke kolektantoj (adoltuloj) de ajlaj folioj senintence kolektis similajn foliojn de kolhiko (*Colchicum autumnale*), kiuj estas venenaj.

Precipe infanoj povas veneniĝi per belaj, sed venenaj, fruktoj de lonicero (*Lonicera* spp.), taksuso (*Taxus baccata*), *Solanum dulcamara*, *S. nigrum*, *Daphne mezereum* kaj aliaj plantoj.

Eĉ abunda kaj bone konata herbeja planto okzalo (*Rumex acetosa*), kies acidajn foliojn ni gustumis dum nia infanaĝo, povas esti danĝera, ĉar okzala acido (COOH)<sub>2</sub> ligas kalcion en sango kreante nesolveblajn kristalojn de kalcia-etandiat (COO)<sub>2</sub>Ca. Oni trovis mortajn infanojn, en kies stomakoj estis nur folioj de la okzalo...

Signifo de flaŭro estas grandega. Precipe danke al plantoj ni povas ekzisti. Nuntempe oni multe skribas pri karbona dioksido. Plantoj ludas ĉefan rolon en cirkulado de karbono en naturo.

Kaj nun iomete da ĥemio.



Se du faras ion, la rezultoj ofte ne estas la samaj. Se vi miksigus karbonan dioksidon CO<sub>2</sub> kun akvo H<sub>2</sub>O, kion vi ricevus? Maksimume akvon kun bubloj, sodakvon, se temperaturo ne estus alta. La akvo kun karbona dioksido kreas nestabilan, malfortan karbonan acidon H<sub>2</sub>CO<sub>3</sub>.



Sed la plantoj enhavas verdan pigmenton ĥlorofilon kaj helpantajn pigmentojn ksantofilojn (flavajn kaj ruĝajn pigmentojn), kiuj kapablas kapti sunan energion. La planto **ligas sunan energion en energio de ĥemiaj valentoj** kreante de karbona dioksido kaj akvo **oksigenon** kaj utilan ĥemiaĵon (**glukozon**). Eĉ la plej malgranda verda planto produktas oksigenon, kiun ni spiras.

Oksigenon ni bezonas por spirado. Molekuloj de glukozo  $\text{C}_6\text{H}_{12}\text{O}_6$  povas polimeriĝi. La ĉeno de granda amaso (n) da molekuloj de glukozo estas **celulozo**  $[\text{C}_6\text{H}_{12}\text{O}_6]_n$ , la plej malnova natura polimero. Sed per alia tipo de polimerigado rezultas ekzemple **amelo**. La plantoj ne havas nur karbona metabolismo, sed ankaŭ la metabolismoj de nitrogeno, sulfuro, fosforo k. a.

Post morto pere de multaj organismoj mortaj korpoj de plantoj la karbonon ellasas. Tiel la karbono revenas en karbonan ciklon.

**!** Vi certe scias, ke aŭtomobila motoro dum 100 km de veturado bezonas tiel multe da oksigeno, kiu sufiĉas al du adoltuloj por tuta jaro.

Danke al plantoj ni havas nutraĵojn, krudmaterialojn kaj medikamentojn.



*Prunus serrulata*



Danke al arboj, arbedoj kaj aliaj plantoj urbaj stratoj aspektas pli bele. Tie estas **ombro, pli granda humideco kaj pli malvarme**. Se en senarba strato estas  $+35^\circ\text{C}$ , en simila strato kun arboj estas nur  $+25^\circ\text{C}$ .



Verdaĵo kaŝigas malbelecon.

Verdaĵo en urbo kapablas kaŝigi malbelecon.

Danke al plantoj eĉ en la urbo ni povas observi interesajn insektojn, birdojn kaj bestojn.

Buntpego granda konstruas sian neston.



Sciuro (*Sciurus vulgaris*) kaj sito (*Sitta europaea*)



*Iphiclides podalirius*



Abelo sur ciĥorio (*Cichorium intybus*)



Planto *Bryonia alba* + abelo *Andrena florea*



Kelkaj organismoj specialiĝis al unusolaj plantaj specioj. Plimulto da abelaj specioj kapablas uzi por sia nutraĵo polenon kaj nektaron de multaj plantaj specioj. Sed la abelo *Andrena florea* estas nutraĵa specialisto, kiu utiligas nur nektaron kaj polenon de brionio blanka (*Bryonia alba*). Tiu floro apartenas en la familion Cucurbitaceae. Ĝi havas flavajn florojn kaj venenajn malhelbluajn fruktojn. Tial la abelo *Andrena florea* troviĝas nur tie, kie floras la brionio.

*Catocala sponsa*



Alia ekzemplo de nutraĵa specialisto estas nokta papilio *Catocala sponsa*, kies raŭpoj voras nur kverkajn foliojn.



Sako por akvumado de arbo




Pri flaŭro de Brno oni devas zorgi. Laboristoj de specialaj firmaoj fortranĉas malnovajn branĉojn, akvumas arbojn, plantas florojn. Sed ankaŭ loĝantoj de Brno volas havi sian urbon belan, tial ili volonte zorgas pri plantoj.

*Ginkgo biloba*



Ekzota arbo *Ginkgo biloba* kreskas en parkoj, centra tombejo, sed la plej alta (pli ol 200-jara) ekzemplero estas admirebla en ĝardeno de aŭgustinana monaĥejo, kie en la 19-a jarcento laboris Mendel.

*Juglans regia*



En Suda Moravio kreskas varm-amanta arbo *Juglans regia*, kies malmolajn nuksojn oni uzas por fabrikado de juveloj. En Brno ĝi kreskas ekzemple antaŭ kazerno en la Strato Lidická.

Sovaĝaj mambestoj (kapreoloj, aproj, kastoroj) ne estas ĉefaj damaĝantoj de flaŭro.

Flaŭro estas damaĝita de sala surŝutado (precipe natria klorido), kiun oni uzas vintre.

Aero en *Brno* estas poluita precipe de fabrikaj fumo kaj gasellasilaj gasoj de multaj aŭtomobiloj.

La flaŭron damaĝas homoj, kiuj forĵetas balaĵon. Kien homoj povas iri per aŭtomobilo, tie ili kreas rubejon. Sed la plej danĝeraj estas konstruantoj de mamutaj stokejoj de komercaj ĉenoj. Ili preferas konstrui ne en urbo, sed pli ekonomie en herbejoj kaj kampoj. Kie iam estas betono aŭ asfalto, tie ili restos por eterne. Kaj dekonon (1/10) de Ĉeĥa Respubliko jam estas kovrita per betono!

**!** Organizo BGCI (*Botanic Gardens Conservation International*), kiu grupigas botanikajn ĝardenojn, avertas, ke 17 500 arbaj specioj en la mondo estas endanĝeritaj. Ili povas elmorti.

2019: Skolita kalamito



En la jaro 2019 skolitoj (*Ips typographus* kaj *Ips duplicatus*) atakis precipe pinglarbajn monokulturojn de piceoj kaj pinoj, ne sole starantajn pinglarbojn en urbo.

Piceo – *Picea abies*



Ekzemple tiu ĉi piceo en Brno-Královo Pole ne estis atakita, ĉar ĝi staras sole.

2019: Tromultiĝo de mikroto kampa (*Microtus arvalis*)



En la jaro 2019 kulminis kvarjara ciklo de mikroto kampa (*Microtus arvalis*). Tio signifas, ke ni povas atendi venontan mikrotan kalamiton en la jaro 2023.



Sed la plej kruelaj kaj insidemaj malamikoj estas homoj. *Paulownia tomentosa* estas bela arbo. Ĝi devenas el Azio. De ligno de paŭloŭnioj oni fabrikas muzikajn instrumentojn. Floroj donas nektaron kaj polenon al abeloj.

En Brno-Řečkovice unu paŭloŭnio kreskis proksime trotuaro. Sed iam mi observis, ke la arbo malaperis. Iu ĝin forhakis. Verŝajne li tion faris nokte kaj tuŝproksime de tero, por ke homoj nenion observis. Sed al mi la paŭloŭnio mankis. Kaj baldaŭ mi eksciis, kial iu la paŭloŭnion forhakis. En la lokon, kie antaŭe kreskis la paŭloŭnio, iu firmao metis sian grandan reklaman afiŝon. Tio ne estis reklamo por signifa varo, sed pro tio la paŭloŭnio devis morti. Komerca intereso estis pli forta ol rilato al naturo. Mi tre bedaŭris, ke bela arbo estis neniigita nur pro ies profito. Krom tio la reklamo en tiu loko ne restis longtempe. Bonŝance en tero restis radikoj de la paŭloŭnio. El la radikoj elkreskis kelkaj novaj paŭloŭnioj.

En Brno estas ankaŭ kelkaj bedaŭrindaj alvenintoj (neoriginaj vivantaj organismoj).

Neoriginaj plantaj kaj bestaj specioj estas pli modestaj,

pli rezistaj,

pli agresemaj,

kaj pli generemaj ol originaj specioj.

Krom tio en nova trovloko ili ofte havas nenian naturan malamikon.

Ili konkuras al originaj specioj okupiĝante iliajn trovlokojn kaj forprenante iliajn nutraĵojn.

Ekzemploj de neoriginaj specioj:



### ***Robinia pseudo-acacia***

Oni alportis la planton el Ameriko jam en la 16-a jarcento. La unua ĝardenisto, kiu ĝin plantis, nomiĝis Jean Robin (1550 – 1629). En la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento oni ofte plantis tiun arbon. Argumentoj estis klaraj: la arbo bele aspektas, blankaj floroj donas nektaron al abeloj, same kiel sur radikoj de aliaj lantoj el la familio Fabaceae sur la radikoj de robinioj troviĝas bakterioj, kiuj ligas aeran nitrogenon kaj fertiligas teron. Rezultoj ne estis bonaj. La robinioj pikas, rapide disvastiĝas, el siaj radikoj ili ellasas venenan substancojn, kiuj venenigas teron. Post forhako el radikoj baldaŭ kreskas novaj kaj novaj robinioj.



Mahonio – *Mahonia aquifolium*



***Mahonia aquifolium***

La planto, kiu fuĝis el ĝardenoj kaj parkoj. Nuntempe tio estas pikanta planto, kiu okupacias novajn kaj novaj areojn, precipe en foliarbaroj.

*Impatiens glandulifera*



***Impatiens glandulifera***

Bela planto kun blankaj, ruĝkoloraj kaj ruĝaj floroj. Ĝi rapide disvastiĝas sur bordoj de akvofontoj, kie subpremas indiĝenajn plantajn speciojn.

*Reynoutria japonica*



***Reynoutria japonica***

Agresema planto, kiu subpremas indiĝenajn plantajn speciojn.

*Solidago canadensis*



***Solidago canadensis***

La planto, kiu fuĝis el ĝardenoj kaj jam okupacias grandegajn areojn. Ĝi floras ekde fino de julio ĝis novembro. Ĝia poleno estas signifa alergeno.

En Brno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas ankaŭ **raraj plantoj**. Jen kelkaj ekzemploj:

*Phyllitis scolopendrium*



***Phyllitis scolopendrium***

Filiko, kiu ne havas dividitajn foliojn. Ĝi kreskas en Moravia Karsto, sed unu trovloko estis trovita ankaŭ en Brno. Verŝajne sporoj de la filiko estis transportitaj per vento aŭ birdoj.

*Juniperus communis*



***Juniperus communis***

Ĝi kreskas sur sekaj deklivaj paŝtejoj. En ĉirkaŭaĵo de Brno ĝi estas tre rara, ĉar paŝtejoj estis influitaj per plugago, sterkado kaj plantado de aliaj arboj. Homoj kolektas fruktojn, kiujn misuzas por preparado de alkoholaĵoj.

Taksuso – *Taxus baccata*



**Taksuso – *Taxus baccata***

Rara pinglarbo, kiu malrapide kreskas, tial en nuntempaj arbaroj, kiuj estas uzataj por produktado de ligno, ne havas ŝancon kreski. En Brno ĝi estas abunda en parkoj, tombejoj kaj ĝardenoj. Tuta planto estas venena, escepte de ruĝaj dolĉaj saketoj, kiuj enhavas semojn.

*Nuphar lutea*



*Nymphaea alba*



***Nuphar lutea* kaj *Nymphaea alba***  
Floroj, kiuj estas endanĝeritaj per poluado de akvo kaj intenziva fiŝbredado.

*Anemone sylvestris*



***Anemone sylvestris***  
La floro similas al abunda *Anemone nemorosa*, sed estas pli alta, eĉ 25 cm.

*Pulsatilla nigricans*



***Pulsatilla granda***  
En Brno sur la monteto *Kamenný vrch* estas natura rezervejo, kie oni povas admiri florantajn pulsatilojn.

Adonidoj

*Adonis vernalis*



*A. aestivalis*



***Adonis vernalis* kaj *Adonis aestivalis***  
*A. vernalis* estas okulfrapa varm-amanta floro, kiu en Brno jam elmortis. Rilata specio *A. aestivalis* en Brno ankoraŭ troviĝas.

*Primula veris*



***Primula veris***

Printempa floro, kiu estas endanĝerita per hobiĝardenistoj, kiujn ĝin ŝtelas por siaj privataj ĝardenoj.

*Cyclamen purpurascens*



***Cyclamen purpurascens***

Belega floro, kiu troviĝas en foliarbaroj. Bedaŭrinde ankaŭ parto de ĝia trovloko estis neniigita (1987) per konstruado de motorisma konkurejo *Grand Prix*.

*Cornus mas*



***Cornus mas***

Varm-amanta arbedo de arbar-stepaj trovlokoj. Ĝi bezonas sufiĉe da lumo, tial en arbaroj ĝi ne kreskas. Iam ĝin plantas en ĝardenoj pro floroj kaj fruktoj.

*Vinca minor*



***Vinca minor***

Tiu planto ne estas tre endanĝerita. Oni ĝin ofte plantas, tial ne estas klara, kiuj populacioj estas originaj kaj kiuj disvastiĝis el ĝardenoj.



*Lilium martagon*



***Lilium martagon***

Sovaĝa lilio apartenas al tre endanĝeritaj specioj.

*Muscari racemosa*



***Muscari racemosum***

Ĝi estas origina specio nur en suda Moravio. En Brno estas la floroj, kiuj disvastiĝis el ĝardenoj.

Galantoj - *Galanthus nivalis*



Leŭkojoj - *Leucojum verum*



***Galanthus nivalis* kaj *Leucojum verum***

La plej konataj printempaj floroj, kiuj estas endanĝeritaj per neniigo de trovlokoj kaj ŝtelado en privataj ĝardenoj.

*Iris pseudacorus*



***Iris pseudacorus***

Marĉa planto, kiu troviĝas sur bordoj de akvofontoj.

! Protekto de la plantoj estas precipe protekto de biotopoj, en kiuj la plantoj kapablas evolui.

Fiziologoj studis konduton de la plantoj. Ili eksciis, ke la plantoj estas organismoj, kiuj reakcias alie ol mi, sed same kiel ni **ili estas vivantaj estontoj, kiuj bezonas zorgon kaj amon.**

## Literaturo

### Rekomendita literaturo

- AICHELE, D. & GOLTEOVÁ-BECHTLEOVÁ, M. 1996: Co tu kvete? Kvetoucí rostliny střední Evropy ve volné přírodě. 1-a eld., Prago, Ikar, 430 paĝoj.
- CHYTRÝ, M., KUČERA, T. & KOČI, M. 2001: Katalog biotopů České republiky. Interpretační příručka k evropským programům Nature a Smaragd. 1-a eld., Prago, Agentura ochrany přírody a krajiny, 307 paĝoj.
- ČTK 2021: Skoro třetině druhů stromů hrozí vyhynutí, stovky druhů jsou na pokraji zániku. <https://www.novinky.cz/zahranicni/svet/clanek/skoro-tretine...>, la 1-an de septembro 2021.
- FAUSTUS, L. & POLÍVKA, F. 1976: Botanický klíč. 1-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 480 paĝoj.
- FISCHER, O.A. 2016: Jezuitoj. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 14-an de septembro 2016. [www.literatura.bucek.name/brno/fischer-jezuitoj\\_160917.pdf](http://www.literatura.bucek.name/brno/fischer-jezuitoj_160917.pdf)
- FISCHER, O.A. 2017: Bedaŭrindaj alvenintoj. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 19-an de aprilo 2017. [www.literatura.bucek.name/brno/fischer-bedauxrindaj-alvenintoj-2017-20170424.pdf](http://www.literatura.bucek.name/brno/fischer-bedauxrindaj-alvenintoj-2017-20170424.pdf)
- FISCHER, O.A. 2018: Ie sub niaj piedoj... 1-a eld., Brno, MSD, 79 paĝoj.
- FISCHER, O.A. 2018: A record of *Aiolopus thalassinus* (Orthoptera, Acrididae) from Brno (Czech Republic). Acta Musei Moraviae, Scientiae biologicae 103: 123-126.
- FISCHER, O.A. 2021: Sovaĝaj bestoj en industria urbo Brno. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 6-an de aprilo 2021. [www.literatura.bucek.name/brno/fischer\\_Bestoj\\_en\\_Brno.pdf](http://www.literatura.bucek.name/brno/fischer_Bestoj_en_Brno.pdf)
- HRON, F. & ZEJBRLÍK, O. 1974: Kapesní atlas. Rostliny polí a zahrad. 1-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 403 paĝoj.
- HRON, F. & ZEJBRLÍK, O. 1983: Kapesní atlas. Rostliny luk, pastvin., vod a bažin. 2-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 424 paĝoj.
- JIRÁSEK, V. & STARÝ, F. 1986: Atlas léčivých rostlin. 1-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 368 paĝoj.
- KNAUEROVÁ, M. & DRNKOVÁ, J. 2017: Atlas bylin. 1-a eld., Brno, Edika, 144 paĝoj.
- KOBLÍŽEK, J. & ŘEPKA, R. 2003: Klíč k určování stanovištně významných lesních rostlin ve vegetativním stavu. 2-a eld., Tišnov, Sursum, 480 paĝoj.
- MARTINOVSKÝ, J. & POZDĚNA, M. 1987: Klíč k určování stromů a keřů. 2-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 207 paĝoj.
- MLADÁ, J. & PROCHÁZKA, F. 1987: Atlas cizokrajných rostlin. 1-a eld., Prago, Státní zemědělské nakladatelství, 342 paĝoj.
- MLÍKOVSKÝ, J. & STÝBLO, P. (Ed.) 2006: Nepůvodní druhy fauny a flóry České republiky. 1-a eld., Prago, Český svaz ochránců přírody, 496 paĝoj.
- NENTWIG, W. (Ed.) 2014: Nevítání vetřelci. Invazní rostliny a živočichové v Evropě. 1-a eld., Prago, Academia, 247 paĝoj.
- PILÁT, A. & UŠÁK, O. 1988: Kapesní atlas rostlin. 9-a eld., Prago, Státní pedagogické nakladatelství, 255 paĝoj.
- PODHRADSKÁ, V. 2012: Grava persono en Brno Doc. RNDr. MVDr. h.c. Ing. Jaromír Šikula, CSc. Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 22-an de februaro 2012. [www.literatura.bucek.name/brno/podhradska\\_sikula.pdf](http://www.literatura.bucek.name/brno/podhradska_sikula.pdf)
- RŮŽIČKA, V. & SMEJKAL, M. 1988: Chráněné rostliny okresu Brno-město. 1-a eld., Brno, Městské kulturní středisko S. K. Neumanna, 57 paĝoj.
- ŠIKULA, J. 1988: Způsoby zúrodnování půdy na zahrádkách. 1-a eld., České Budějovice, Výstavnictví zemědělství a výživy, 77 paĝoj.
- ŠIKULA, J. & ZUBRICKÝ, J. 1964: Veterinární botanika a píceinářství. 1-a eld., Prago, Státní zemědělské nakladatelství, 537 paĝoj.
- ŠTOLFA, V., TOMEČEK, J. & CHYTRÁ, M. 1996: Teplomilná květina jižní Moravy. 2-a eld., Brno, Svan, 135 paĝoj.
- TOLASZ, R., MÍKOVÁ, T., VALERIANOVÁ, A. & VOŽENÍLEK, V. 2007: Atlas podnebí Česka/Climate atlas of Czechia. 1-a eld., Prago kaj Olomouc, Český hydrometeorologický ústav, Univerzita Palackého, 255 paĝoj.

Ĉiujn fotojn kaj unu desegnaĵo, kiuj estis uzitaj en tiu ĉi prelego, kreis Oldřich Arnošt Fischer, la aŭtoro.